

SEPTEMBRO 2007

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2007:4



Esperanto- examen i Lesjöfors

I samband med svenska esperantokongressen på EsperantoGården i Lesjöfors passade flera esperantister på att avlägga examen i esperanto.

Några av deltagarna visar upp sina diplom.

Läs mer om svenska esperantokongressen på sidan 3.

Foto: Agneta Emanuelsson

Universell Esperanto- Kongress i Japan

19 svenskar deltog i den universella esperantokongressen som i år ägde rum i Yokohama i Japan. Där fanns det tillfälle att tala esperanto med 1901 esperantister från många länder och självklart att göra utflykter till sevärdheter som t.ex. till Fuji.

Läs mer om den universella kongressen på sidan 4.

Foto: Wikipedia



LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Septembro 2007 • 95-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: esperanto@globalnet.net

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2007: 200 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlems-
avgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00

E-post: sef@esperanto.se
Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2007:
Direktanslutnen medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar un-
der 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Espe-
rantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.
Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG
Postgiro: 578-5 **Nätsida:** www.algonet.se/~eldona/
E-post: eldona@telia.com **Telefon:** 031 - 12 05 94.

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,
Nätsida: www.e-g.se **E-post:** egarden@esperanto.se
Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11
961 76 Boden, tel. 0921-123 54
e-post: esperanto@globalnet.net

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Troligen kommer nr 5 och 6 att sändas ut gemensamt
kring 15 november. Nr 6 får då formen av ett litteratur-
nummer. Se vidare på sidan 6.

NI PREZENTAS

Christer Lörnemark

Kie vi naskiĝis?

En la hospitalo de Uddevalla. Mi
kreskiĝis en Dingle en Bohuslando.

Kie vi loĝas?

En Karlstad, en urboparto kiu
nomiĝas Kronoparken.

Pri kio vi laboras?

Mi havas propran entreprenon kiu
okupiĝas pri lingvoexplorado, verka-
do kaj komponado. Plej multe mi nun
laboras pri parollingva korpuso de
Esperanto, t.e. kolekto de trans-
skribaĵoj, surbaze de kiuj oni kalkulas
oftecojn de vortoj, radikoj, kaj koloka-
cioj (vortoj kiuj troviĝas unu apud la
alia).

*Kiujn interesojn vi havas krom Espe-
ranto?*

Muzika komponado, verkado, lingvis-
tiko kaj fonetiko, komputiloj,
ekonomi(k)o inkluzive librotrenadon,
la portugala lingvo, diversaj lingvoj.

Ĉu vi havas familion?


Mi nek havas infanojn nek edzinon,
kaj ne havas koramikinojn ĝuste nun.
Miaj du fratinoj ambaŭ havas edzojn
kaj infanojn. Mia patrino ankoraŭ vi-
vas kun sia nova edzo.

De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?

En oktobro 1985 mi trovis la lernoli-
bron "Ek!" en la urba biblioteko de
Uddevalla. Tiu lernolibro estas sufiĉe
ripetema kaj teda. Mi memstudis. La
unua kunveno esperantista kiun mi
vizitis okazis en decembro 1986 en
Gotenburgo. Mi partoprenis kurson
en Pisanica, Bulgario en aprilo-majo
1987.

*Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la
Esperanto-movado?*

Dum 17 jaroj mi estis estrarano de E-
organizoj en Gotenburgo. I.a. mi es-
tis kasisto de Esperanto-Alianco de
Gotenburgo (1987-1992), prezidan-
to de la E-klubo Interservo (1989-
1992), prezidanto de E-Societo de
Gotenburgo (1994-2004), ano de la
komitato pri la Nilsona Fonduso



(1990-2004). Mi estis estrarano de
SEF (2001-2004) kaj ano de Komita-
to (2001-2004). Je UK2003 en Goten-
burgo mi estis vicprezidanto de LKK,
kunrespondeca pri informado. Mi es-
tas kunlaboranto de Nitobe-Centro
(www.nitobe.info).

*Kiu estas via preferata libro en Espe-
ranto?*

La faraono.

Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?

Mi komponis ĉ. 170 muzikajn ver-
kojn. Neniu el ili estas ankoraŭ kon-
certe prezentita, parte ĉar mi mal-
multe komponis dum 18 jaroj (1987-
2005).

Jen ekzemploj:

Somera muziko (2006, inspirita de la
UK en Florenco) [http://
www.literaturo.se/loerne/197.aif](http://www.literaturo.se/loerne/197.aif)
199.1 (2006) (dekdutona muziko
kun drumbatoj) [http://
www.literaturo.se/loerne/199.1.aif](http://www.literaturo.se/loerne/199.1.aif)

Mi estas estrarano de la eldonejo
LiteraTuro (www.literaturo.se). Ĝi el-
donis Esperanto por gimnazianoj
(Forsman, Lörnemark, Randehed,
Wedlin). Baldaŭ aperos Doktor Za-
menhof och det internationella språ-
ket de Nordenstorm kaj Lörnemark.

Skribe intervjuis: Leif Nordenstorm

Estimataj samideanoj!

Denove mi pretigis numeron de *La Espero*. Mi dankas al ĉiuj, kiuj sendis
tekstojn kaj fotojn. Bedaŭrinde ne estis loko por ĉio.
Tamen ne hezitu sendi novan materialon. Por la sesa numero mi bezonas
novelojn, poezion kaj popularsciencajn artikolojn.
Mi deziras al vi iuj agrablajn aŭtunajn tagojn.

Via redaktoro

ESTRAROJ

Post la jarkunveno la estraro de Sveda Esperanto-Federacio konsistas el: Bengt Olof Årads-son (prezidanto), Ann-Louise Åkerlund, Mhedi Beatrix Strid (kasisto), Wim Posthuma, Bengt Nordlöf kaj kiel anstataŭantoj Roland Lindblom kaj Leif Nordenstorm.

La estraro de ILEI-se (Svenska esperantolärares förening) konsistos el Siv Burell (prezidanto), Bo Hedberg (sekretario), Siv Sjögren (kasisto), Inga Johansson, Fredrik Olofsson kaj kiel anstataŭantoj Ragnhild Berglund kaj Ralf Jalming.

Svedoj kongresis en EsperantoDomo

Kelkaj personaj impresoj pri la SEF-kongreso en Lesjöfors 2007.05.18-20

Pro malfavora fervoja kaj aŭtobusa komunikado inter Sundsvall kaj Lesjöfors ni devis veturi per nia propra aŭtomobilo al la Esperantodomo. Tio signifis vojaĝon tien de proksimume 480 kilometroj. Amike nin ricevis la akceptantaro kaj la faktoto de la Esperantodomo Lennart Svensson.

Jam dum la interkona vespero montriĝis, ke la kongresanaro estis sufiĉe malmultnombra. Proksimume 35 personoj ĉeestis; sed la atmosfero estis bona, kaj la kunestado estis inspirita.

Inter la ĉeestantoj troviĝis paro el Belgio kaj sinjorino el Svislando. Mireille Grosjean. Ŝi estas spertulino pri lingvoekzamenaj aferoj kaj prelegis pri plibonigitaj eblecoj ricevi bonkvalitajn esperantoekzamenojn en Eŭropo.

La belgino Flory Witdoeckt prelegis pri iuj aspektoj kunlige kun la Eŭropa Unio. Kelkaj partoprenantoj ne havis la saman opinion pri certaj demandoj, kaj interesa diskuto ekestis.

Oni tamen ne tuŝis la vere gravan demandon, ĉu la Eŭropa Unio disvolviĝu al grandpotenca superŝtato, aŭ ĉu ĝi estu unio por kunlaborado inter suverenaj ŝtatoj.

Tre interesa estis la dimanĉa ekskurso al la malnova Råmen-preĝejo, kiun oni nun renovigas. Membro de la eklezia konsilantaro parolis kun fiereco pri la rekonstruado kaj rakontis pri la historio de la preĝejo. Fine ni havis la eblecon celebri esperantan diservon en la preĝejo. Ĝi konsistis el biblia legado kaj kantado el la esperantopsalmaro Adoru.

Pri la jarkunveno de SEF kaj aliaj jarkunvenoj mi povis konstati, ke ili okazis en bona etoso.

Fine mi kaj mia edzino Anna volas esprimi koran dankon al Lennart Svensson pro la bone preparitaj manĝaĵoj kaj al la muzikistoj, kiuj distris nin per bela, ĉefe popola muziko el Svedio kaj el aliaj landoj.

Mats Landfors



SEJU kantas kun helpo de Andreo Bertse. Fotis: Agneta Emanuelsson

10a Internacia Fotokonkurso

Post naŭ sukcesaj konkursoj (1998–2006) la redakcio de "La Ondo de Esperanto" invitas al partopreno en la deka Internacia Fotokonkurso. En la fotokonkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15x20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La fotoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1a de decembro 2007.

La konkursaj fotoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de "La Ondo de Esperanto" en 2008.
2. 25 eŭroj kaj abono de "La Ondo de Esperanto" en 2008.
3. abono de "La Ondo de Esperanto" en 2008.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de "La Ondo de Esperanto") por la plej bona foto pri la temo Festoj.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en "La Ondo de Esperanto". La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31a de decembro 2009 ekskluzivan rajton uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-rajton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj. Legu pli pri niaj Fotokonkursoj <http://www.esperanto.org/Ondo/lnd-fk.htm>

Halina Gorecka
sekretario

Mil naŭcent esperantistoj en Jokohamo

Al la 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo aliĝis 1901 esperantistoj el 57 landoj.



La dua UK en Japanio estis do pli multnombra ol la unua, kiu okazis en Tokio en 1965 kaj arigis 1710 aliĝintojn. En Jokohamo ĉeestis krome 160 personoj, kiuj aĉetis 196 unu-tagajn kartojn. La oficiala statistiko de UK-aliĝintoj, kiu aperas i.a. en la Jarlibro de UEA, tamen ne inkluzivas aĉetintojn de unu-tagaj kartoj.

Plej multe da kongresanoj, 1024, liveris la gastiganta lando Japanio. Minimume 10 aliĝintoj venis el Francio (94), Korea Respubliko (91), Germanio (62), Ĉinio (57), Litovio (49), Italio (46), Rusio (35), Pollando kaj Usono (po 34), Brazilo kaj Nederlando (po 32), Britio kaj Hispanio (po 24), Irano kaj Svedio (po 19), Finnlando, Kroatio kaj Svislando (po 18), Aŭstralio, Belgio kaj Bulgario (po 16), Ĉeĥio (12), Hungario kaj Israelo (po 11), kaj Slovakio kaj Vjetnamio (po 10).

Probal Dasgupta iĝis prezidanto de UEA



Komence de la lunda kunsido de la komitato de UEA en Jokohamo estis diskonigita la rezulto de la fermita baloto pri la nova estraro de UEA. La nombrado de la balotiloj montris, ke la la komitato elektis estraron laŭ la

rekomendoj de la elekta komisiono, tamen sen Marija Beloseviĉ el Kroatio. La nova prezidanto de UEA ekde lundo do estas Probal Dasgupta el Barato (Hindio). Por Probal Dasgupta voĉdonis 49 komitatanoj, por Marija Beloseviĉ nur 9. "Ni okupiĝu ne nur pri la lingvo Esperanto, sed ankaŭ pri interkompreno", diris Probal Dasgupta post sia elekto.

Nova estraro

La nova estraro de UEA havas sep membrojn: Ranieri Clerici el Italio vicprezidanto, Probal Dasgupta el Barato (prezidanto), Loes Demmendaal el Nederlando, Hori Jasuo el Japanio, Claude Nourmont el Luksemburgio (vicprezidanto), Barbara Pietrzak el Pollando (ĝenerala sekretario) kaj José Antonio Vergara el Ĉilio.

El la sep estraranoj, tri estas virinoj, kaj same tri ekstereŭropanoj. El la malnova estraro de UEA restas nur Claude Nourmont.

El la personoj kiujn rekomendis la elekta komisiono, ne estis elektita kiel estrarano Marija Beloseviĉ el Kroatio. La landa asocio de UEA en Kroatio pli frue forte protestis kontraŭ ŝia elekto, ĉar ŝi fondis kaj gvidas konkurantan tutlandan asocion en Kroatio. Nur 9 komitatanoj voĉdonis por ŝia elekto, 36 voĉdonis kontraŭ, kaj 7 sin detenis.

La membroj de la nova Estraro de UEA, elektita en la UK en Jokohamo, decidis pri disdivido de ĉefaj respondecas. Prezidanto Probal Dasgupta respondecas pri kunordigo kaj ĝenerala planado de la agado. Vicprezidanto Ranieri Clerici gvidos la eksterajn rilatojn de la Asocio, dum la reelektita alia vicprezidanto Claude Nourmont plu respondecas ankaŭ en la nova Estraro pri edukado, kulturo kaj kongresoj. Barbara Pietrzak okupiĝos, krom pri kutimaj taskoj de ĝenerala sekretario, ankaŭ pri informado. Loes Demmendaal estas estrarano pri financo kaj administrado. Pri landa kaj regiona agado respondecas Hori Yasuo, dum Jose Antonio Vergara ekgvidas la fakan kaj scienca agadon de UEA.

La estraranoj dividos inter si poste ankoraŭ diversajn specifajn taskojn. Dum la proksimaj monatoj ili ankaŭ elektos multajn komisionojn kaj komisiitojn.

Honorigoj

En la 92-a Universala Kongreso en Jokohamo UEA ricevis du novajn Honorajn Membrojn. Pro iliaj gravaj servoj al la tutmonda Esperanto-movado la Komitato de UEA distingis d-ron Endre Dudich el Hungario kaj prof. Konisi Gaku el Japanio.

D-ro Dudich naskiĝis en 1934 kaj laboris profesie kiel geologo, i.a. ĉe Internacia Unio de Geologiaj Sciencoj en Parizo. Li estis i.a. membro de la Komisiono de UEA pri Scienca kaj Faka Aplikado de Esperanto kaj vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio. Liaj ĉefaj Esperantaj verkoj estas la geologia lernolibro "Ĉu vi konas la teron?" kaj la sciencfikcia romano "La lumo nutranta".

Konisi Gaku, universitata profesoro pri fiziko, naskiĝis en 1934. Li estas prezidanto de la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj kaj longtempa juĝanto de la Belartaj Konkursoj de UEA. Li multe tradukis, i.a. "La neĝa lando" de Kawabata Yasunari kaj "Nokto de la galaksia fervojo" de Miyazawa Kenzi. De li aperis la originalaj prozaĵoj "La kosmoŝipo Edeno n-ro 5" kaj "Vage tra la dimensioj". En 2006 aperis ampleksa "Esperanto-japana vortaro", kies redaktan komitaton li gvidis.

En Jokohamo la Komitato starigis ankaŭ novan formon de honorigo, Diplomon pri Elstara Agado, pri kies aljuĝo decidas la Estraro. Ĝiaj unuaj ricevantoj estas la germana Interkultura Centro Herzberg kaj s-ro Donald J. Harlow el Usono. La Centro en Herzberg famiĝis en la Esperanto-movado pro sia aktiva kaj altkvalita agado, kies elstara frukto estis la decido de la urbo Herzberg oficiale deklari sin Esperanto-urbo. S-ro Don Harlow estis diplomita pro pionira Esperanta aktivo en Interreto.

Laŭ materialo de UEA kaj www.liberafolio.org



Laŭtleĝado de poezio en Esperanto kaj tradukoj de Esperanto en la japanan. Foto: www.liberafolio.org

ANONCETOJ

DEZIRAS
KORESPONDI:

Japana 42-jara teknikisto, kiu interesiĝas pri muziko, kino, libroj k.t.p. Kinoshita Mayumi, 1-505, 1-chome 4 ban, Shinmachi, z Nishi Tokyo City, Tokyo 202-0023, Japanio. joymk@eb.mbn.or.jp.

Mia nomo estas anne p. linares-crilly, mi estas perua-esperantistino kiu loĝas usone...mi amas la lingvo tre multege...mi volas korespondi ĉi-umonde nur esperante pro tio mi kreis ĉi tiun retleteron...mi petas ke vi diru al ĉiuj kiuj volas la praktikadon de la lingvo korespondi kaj skribi al: KaraloPeruo8@excite.commi tre dankas al vi, elkore anita linares-crilly

På Stockholms universitet

"Grundkurs i esperanto, 30 hp" komer att gå på Stockholms universitet ht07/vt08. 23 är anmälda, och det är tillräckligt många för att kursen skall bli av.

Kubanino en radio

Vizitinte Svedion, Maritza Gutierrez Gonzalez, estraranino de UEA, estis en en la urbo Västerås la 6an kaj 7an de majo. Ŝi renkontis anojn de la esperantista klubo, latinamerikanojn kaj aliajn enloĝantojn de la urbo. La Sveda Radio P4 por la gubernio Västmanland, kiu eĉ aŭdeblas en Stokholmo, interesiĝis renkonti kolegon (Maritza) de Habano. La intervjuo dauris ĉ. 20 minutojn kaj okazis ĉefe en la svedaj kaj esperanta lingvoj. La programo enhavis demandojn pri Esperanto kaj jazan muzikon. Kaj Stridell, konata jazmuzikisto kantis sian tradukon de konata jaskanto. S-ro Kaj Stridell ankaŭ estis la interpretisto dum la elsendo.

Wim Posthuma

kaj ankaŭ Vermlandano...

Radio Värmland... jag var med i radion den 16 april, då handlade programmet om Esperanto, direktsändning från studion i Karlstad. Naturligtvis fick jag även med litet om EsperantoGården, jag lyckades hänga med i sändning i 15-20 minuter.

På tisdag veckan efter, den 24 april satt jag och drack förmiddagskaffe på EG när jag hörde att någon knackade på dörren. När jag kom ut stod det en man med bandinspelare och en mikrofon i handen.

Han skulle göra ett program om Lesjöfors. Reporteren hamnade bl.a på EsperantoGården och jag råkade vara där.

Fick se att kvällens programpunkt för Karlavagnen var fritt... skrev ett mail och skickade, vid 20-tiden ringde de från programmet och sedan gick jag ut i sändning 21.40 (programtid ca 20 min).

Lennart Svensson

Tritaga kurso en Mullsjö

Kiel en la pasinta jaro ILEI-se aranĝis Esperanto-kursojn en Mullsjö, ĉi tiun fojon kune kun la studronda asocio BILDA, Jönköping.

Venis 29 personoj. Bertil Nilsson, la dua de dekstre sur la foto, instruis la komencantojn (kaj kelkajn komencintojn).

Magnus Henoch, Carl Mäsak kaj mi provis inspiri la jam bone parolantajn partoprenantojn al diskutoj. Oni elektis diversajn temojn.

Grupo inter la du ekstremoj ne troviĝis ĉi tiun fojon.

La kuiristo Peter Bankholm kune kun Aino Åberg prizorgis la manĝaĵojn kaj por vegetaranoj kaj por ne-vegetaranoj. Ĉiuj laŭdis la bongustajn pladojn. Nur fervora kafotrinkanto plendis ke la kafopaŭzo neofitis.

Du vesperojn Bertil Nilsson prelegis pri la Esperanto-historio en sia absorba maniero.

Li ricevis multajn demandojn kaj estis malfacile esti akurata pri la tempo.

Ni ankaŭ havis tempon por matena gimnastiko, liniodanco, poenta promeno, "mingla promeno" (komencanto kune kun sperta parolanto). La komencantoj jam lernis paroli pri ĉiutagaj aferoj.

Troviĝas dek unu domoj en la kursejo, kelkaj grandaj, kelkaj malgrandaj. La kursvilaĝo estis fondita en 1924 de Charles Allwood, avo de la nuna posedanto Jens Allwood, kiu ankaŭ partoprenis en la kurso. Marston Hill vere estas granda kulturcentro kun influoj de la tuta mondo. La domoj aspektas diverse - hinda domo, ĉina domo, skota ŝtona domo sed ankaŭ ruĝaj lignaj svedstilaj domoj. Dum la 20-a jarcento multaj instruistoj atendis kursojn en Marston Hill por havigi al si la kompetencon instrui pri la angla.

Partoprenis ankaŭ du etinfanoj: Loke, baldaŭ 3-jara kaj Odin, 1-jara, amuzis nin kaj aldonis kroman spicon al la jam bona etoso.

Siv Burell

Garthon om esperanto

Undr rubriken "EU behöver lingua franca" skriver Per Garthon (mp), tidigare europaparlamentariker den 13 augusti i Sydsvenska dagbladet:

"Vi borde inte kapitulera och acceptera att engelskan tar över som EU:s huvudspråk. Det går att stoppa den engelska snöbollen och istället göra ett öppet och demokratiskt val av -latin, -esperanto eller franska."

Den som vill läsa artikeln kan hitta den på internet på sydsvenskan.se



Kelkaj el la 29 partoprenantoj en la Esperanto-kurso en Mullsjö.

ANONCETOJ

DE JAPANA ESPERANTO-
INSTITUTO

Koresponda servo de JEI peras korespondadon inter japanaj kaj eksterlandaj dezirantoj. Se vi interesigas pri korespondo kun japanoj, bonvolu tur- ni vin al:

Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku waseda-mati 12-3, Tokio, 162-0042 Japanio

Skribante al ni korespondo-peton, bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn.

DONACAS

Jarlibrojn de UEA donacas 1922-2000j preskaŭ kompletaj.
esperanto@sverige.nu
tel. 0736- 90 61 18

Esperantisto en PEN preskaŭ elektiĝis

Eugene Schoulgin, 68-jara norvega verkisto loĝanta en Turkio, estas la nova internacia sekretario de PEN-Klubo. Iama gvidanto de la Komitato por verkistoj en prizono, Schoulgin estas eble la plej populara membro de PEN Internacia. Tial estas tute kompreneble ke li gajnis en la baloto per granda majoritato: 50 kontraŭ 30.

La alternativan kandidatecon de Giorgio Silfer damaĝis la memleza taktiko de la franca aliancano Sylvestre Clancier, kiun poste la Asembleo "punis" ne reelektante lin al la estraro. Konsekvence neniu franclingvano sidas nun en la gvidaj organoj de PEN.

Dum la posta tago Clancier ne aperis en la kongresejo, kaj Silfer reprezentis la minoritaton en diversaj traktativoj kun la majoritato pri kelkaj delikataj rezolucioj: ekzemple holokaŭsto kaj estonta kongreso en Latin-Ameriko.

La 73a PEN mondkongreso estis fermita de la ĉefministro kaj de la kulturministro de Senegalio.

HeKo

Rotarianoj

Rotaria Amikaro de Esperantistoj (RADE) kundividas la amikecan senton de frata kompreniĝo inter niaj membroj el diversaj mondo-partoj per la uzo de unusola neŭtrala lingvo Esperanto.

Tiun senton ni klopodis transdoni al niaj kolegoj rotarianoj ĉijare dum junio, okaze de la 98a Monda Kongreso de Rotario Internacia en Salt-Lake-City, Usono, kie RADE starigis la tradician inform-standon kaj aranĝis kunvenon de niaj membroj partoprenantaj la kongreson.

Ankaŭ en Salt-Lake-City ni starigis utilajn kontaktojn kun rotarianoj ne esperantistoj sed interesitaj pri niaj tezoj. Al tiuj kiuj ankoraŭ ne regas Esperanton, ni sugestis eniri la retejon www.kursodesperanto.org kaj mem lerni la lingvon.

En 92a Universala Kongreso de Esperanto. En la kadro de la Movada Fojro, en programo la 4an de aŭgusto posttagmeze, RADE ĉeestis por prezenti al la esperantistoj sian agadon.

Giuseppe Grattapaglia

UK 2009 okazos en Bjalistoko

La jubilea Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2009 okazos en Bjalistoko, la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof. Tio iĝis konata en Jokohamo vendrede la 10-an de aŭgusto. En Jokohamo ĉeestas la urbestro de Bjalistoko, kiu eĉ partoprenis la urbestran akcepton kune kun la kongresanoj.

Jam en sia aprila kunsido la malnova estraro de UEA decidis, ke la Universala Kongreso de Esperanto en 2009 ja okazos en Pollando, sed ne en Varsovio. Restis du polaj urboj, inter kiuj la finan elekton devis fari la nova estraro de UEA en Jokohamo: Bjalistoko kaj Poznano.

La nova estraro de UEA en sia kunsido la 9-an de aŭgusto en Jokohamo decidis, ke la 94-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Bjalistoko, por omaĝi la 150-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L.L. Zamenhof en lia naskiĝurbo mem.

La urbestro de Bjalistoko, Tadeusz Truskolaski ĉeestis la kunsidon, kune kun la prezidanto de Bjalistoka Esperanto-Societo, Elzbieta Karczewska, kaj Aleksander Zdechlik, kiu reprezentis la Ĉefan Estraron de Pola Esperanto-Asocio. Tadeusz Truskolaski transdonis al la estraro alvokon de bjalistokanoj por okazigo de la UK en ilia urbo. Dum unu semajno proksimume 3.500 personoj subskribis la alvokon. Krom entuziasman akcepton de la urbanoj, la urbestro promesis vastan apogon de la urbo al la organizado de la kongreso.

Ludoviko Zamenhof naskiĝis la 15-an de decembro 1859 en Bjalistoko, ĉe la strato Zielona, kiu nun estas nomata strato Zamenhofa. Apud la loko kie iam staris la naskiĝdomo de Zamenhof pendas nun marmora tabulo.

Laŭ informoj de UEA kaj www.liberafolio.org

Belartaj konkursoj

En la Universala Kongreso en Jokohamo oni diskonigis la rezultojn de la Belartaj konkursoj 2007:

POEZIO
•Unua premio: Anja Karkkainen (Finnlando) pro "En ambauŭ;
•Dua premio: Michael Cayley (Britio) pro "Memoroj";
•Tria premio: ne aljuĝita.

Partoprenis 30 verkoj de 16 aŭtoroj el 13 landoj.

PROZO
•Unua premio: Tim Westover (Usono) pro "Rugvela ŝipo";
•Dua premio: Lena Karpunina (Rusio) pro "La botoj";
•Tria premio: Sten Johansson (Svedio) pro "Frotvundo".

Partoprenis 24 verkoj de 13 aŭtoroj el 11 landoj.

ESEO
•Unua premio: Geoffrey Sutton (Britio) pro "Pri la periodoj de la Esperanto-literaturo";
•Dua premio: Paulo S. Viana (Brazilo) pro "Psiko-memhelpa literaturo: utila? senutila? malutila?";

•Tria premio: Tony del Barrio (Hispanio) pro "La normala lingvo".
Partoprenis 8 verkoj de 6 aŭtoroj el 5 landoj.

TEATRO
•Unua premio: ne aljuĝita;
•Dua premio: Brian E. Drake (Usono) pro "Koroj en mallumo";
•Tria premio: ne aljuĝita;

•Honora mencio: Stefan MacGill (Hungario) pro "La aŭto-mato".
Partoprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

INFANLIBRO DE LA JARO
Eldonejo "Éditions Pour penser à l'endroit" pro la libro "Ĉio fareblas de Aline de Pétigny", tradukita de Martine kaj Christian Rivière.

Partoprenis 5 verkoj el 5 landoj.
KANTO

Unua, dua, tria premioj: ne aljuĝitaj;
Honora mencio: Dina Lukjanec (Kazahio) pro "La urbo ora".

Partoprenis 8 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

Literatura numero de La Espero

Ĉu vi verkas novelojn, poezion aŭ popularsciencajn artikolojn en Esperanto? Sendu ilin al la redaktoro de La Espero kiel eble plej frue, tamen ne malpli frue ol en la fino de Oktobro.

Ni klopodos eldoni literaturan numeron de La Espero.

La verkoj devas esti de bona kvalito. La redaktoro de La Espero ne havas eblecon korekti verkojn de komentantoj.

Se vi estas komencanto, petu ke sperta esperantisto korektu vian verkon antaŭ ol sendi ĝin al La Espero.



Mesaĝo al la kongreso

En la Universala Kongreso en Johamo partoprenis ankaŭ Louis Zaleski-Zamenhof, la nepo de la kreinto de Esperanto. Jen lia mesaĝo la la esperantistaro:

Sinjoro Prezidanto,
Gesinjoroj Honoraj Gastoj,
Estimataj Gekongresanoj,

Ĝeamikoj karaj, alvenintaj al Johamo el ĉiuj partoj de nia planedo, akceptu la tradician Zamenhofan saluton!

Vi reunuiĝis por ĝui la sen-egalan, neforgeseblan etoson de niaj kongresoj kaj por debati i.a. pri la akcepto de Okcidento en Oriento aŭ pri rezisto tiurilata. Tiu elektita kongresa temo aperas urĝe aktuala en nia epoko de tutmondiĝo. Fakte, unu jarcenton post nia unua Universala Kongreso, kiam "...inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marco kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj...", nun, citante la vortojn de nia Prezidanto, "... homoj kun homoj ĉi tie reunuiĝantaj venas ne nur de Eŭropo sed de plej diversaj kulturregionoj de la mondo".

Mi, persone, estante inĝeniero de pontoj, ege ŝatus kontribui al konstruo de pontoj de interkompreno kaj de akcepto reciproka inter Oriento kaj Okcidento. Dum mia profesia kariero, plurajn jarojn mi funkciis kiel konsilisto ĉe mondfama Tokia konstrufirmao. Tiam, dum miaj oftaj restadoj en via lando, mi spertis persone la akcepton de Oriento; mi ĝuis amikecon de miaj tiamaj kunlaborantoj, mi estis kore akceptata en iliaj hejmoj, konatiĝis kaj amikiĝis kun iliaj gefamilianoj. Kelkajn jarojn pli malfrue mi estis akceptita ankoraŭ pli sincere, estante, kun mia edzino, invititoj de Oomoto, al kies membroj mi ŝatus eldiri cxi tie mian apartan saluton.

Mi ŝatus aparte saluti ankaŭ doktoron Kobayashi kaj la teamon de tradukintoj de "La Zamenhof-strato", kies laboro estis rekompencita per la belega eldono de la japana versio de la libro. Fine mi dezirus honori la memoron de Ito Kanzi, mia forpasinta spirita frato Ludovikito, el kies senlaca strebo rezultis impona kolekto de la plena verkaro de nia komuna Avo, kies ideoj estas akceptataj de bonpensantoj same en Okcidento kiel en Oriento.

Tamen, kontraŭe al miaj personaj spertoj, mi konscias ke la rezisto inter

Oriento kaj Okcidento certe ankoraŭ ne malaperis. Ĝi rezultas de malkompreno ne nur de lingvo sed ankaŭ de kutimoj kaj ĝenerale de kulturoj malsamaj. Por venki tian reziston ni devas esti armitaj de toleremo ambaŭflanka. Estas ja la idealo de toleremo, kiu antaŭ 120 jaroj naskis nian Lingvon Internacian, por ke ĝi faciligu la komprenon de la diverseco kaj sekve la akcepton de tiu diverseco – de diverseco, sekve de multnombro de kulturoj, kontribuanta al la spirita riĉeco de la homaro.

Ni esperantistoj kontribuas per nia agado al la akcepto kaj ni konraŭbatalas la reziston inter Oriento kaj Okcidento. Mi forte deziras al via Kongreso, ke ĝi estu grava paŝo sur la vojo kondukanta al tiu nobla celo.

Louis C. Zaleski-Zamenhof

Härmed kallas SEJUs medlemmar till ett extrainsatt årsmöte den 23 september i Härnösand, i samband med Apelsinträffen. Förslag till dagordning:

1. Mötets öppnande
2. Godkännande av dagordning
3. Val av mötesordförande
4. Val av mötessekreterare och justerare
5. Verksamhetsberättelse
6. Ekonomisk berättelse
7. Revisorernas berättelse
8. Val av styrelseposter
9. Val av firma- och kontotecknare
10. Verksamhetsplan 1 år + långsiktigt
11. Överlämning av poster
12. Övriga frågor
13. Mötets avslutande

Magnus Henoch
ordförande i SEJU

Välkommen till seminarium 6–8 oktober 2007 på EsperantoGården i Lesjöfors



SVEDA
ESPERANTO
INSTITUTO

Fredag 6 oktober
Möjlig ankomst. Kvällssamling med sång och musik.

Lördag 7 oktober

09.45 Deltagarna hälsas välkomna
10.00–11.30 Sebastian Kirf, Tyskland föreläser: "Esperanto – ett bi drag till förverkligandet av Agenda 21?"
13.00–14.30 Tomas Nilsson m.fl. föreläser om Räntefri ekonomi (JAK-banken, mikrobanks) och ev. Rättvist miljöutrymme

15.30–16.00

16.30 Årsmöte för Institutet
19.30 La Perdita Generacio underhåller

Söndag 8 oktober

09.00–10.00 Sebastian Kirf föreläser en andra gång
10.30–11.30 Martin Strid: "Världen efter oljan"
12.00 Avslutning och lunch

Kostnad för deltagande 1250:- Härtill kommer kost och logi 975:- (flerbäddsrum, sängkläder ingår).


80:- tillkommer för tvåbäddsrum. 150:- tillkommer för enbäddsrum. Maten är vegetarisk. Säg till om annat önskemål vid anmälan. Vid pauser kan inhandlas ex. frukt 5:-, kaffe 10:-, kaffe och kaka 15:-

Anmälan sker senast 15 sept. till Birgitta Anevik,
birgitta.anevik@lidkoping.org
tfn 0510-25388, 0733-266712 eller med betalning till plusgirokonto 51511-4.

Ytterligare info hos Birgitta Anevik.

Grandega vortaro

Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Erich-Dieter Krause. Lerniloj, vortaroj / germana. Helmut Buske Verlag, Hamburg. 2007. 1677 paĝoj. Prezo: 112.50 eŭroj.



Granda vortaro germana-Esperanto aperis ĉi-jare ĉe la germana eldonejo Buske.

La lingvisto Erich-Dieter Krause estas tre konata en Germanio, ĉar li provizis siajn samlingvanojn per vortaroj dum jaroj. Sur miaj librobretoj staras poŝvortaro Esperanto-germana, kiu aperis en 1967 kun 190 paĝoj.

La Esperanto-germana vortaro, kiu aperis samjare kun la UEA-kongreso en Berlino en 1999, estas pli dika, kaj ĝi ricevis la epiteton Granda. Pli da vortoj, pli da paĝoj (882).

La amplekso de vortoj en Esperanto atingas preskaŭ 80000 mil. Krause enkondukis multe pli da vortkunmetoj ol la komparebla vortaro PIV (Plena Ilustrita Vortaro).

La ĉi-jare eldonita Granda Vortaro germana-Esperanto estas eĉ grandega. Ĝi havas 1675 paĝojn, kaj amplekson de 160 000 germanaj vortoj kun tradukoj en Esperanton.

Kiu svedo havas kapablon, tempon kaj energion krei similan vortaron kun tiom da vortoj? La vortaro de Ebbe Vilborg ampleksas 49000 vortojn. La diferenco aspektas terure granda inter 49 000 kaj 160 000, sed tio ne montras ke mankas pli ol cent mil esperantaj vortoj en la sveda vor-

taro. Vilborg povintus aldoni kvin kromajn vortkunmetojn al 25 000 radikovortoj, kaj per dio lia vortaro ampleksus similan kvanton. Mi vere gratulas la germanajn esperantistojn kaj admire riverencas al Erich-Dieter Krause.

Roland Lindblom

Snart kommer



"Doktor Zamenhof och det internationella språket" av Leif Nordenstorm och Christer Lörnemark.

Mer information i nästa nummer av La Espero. Föreslå redan nu ditt lokala bibliotek att köpa in boken.

NOVELETO

Disputo en kinejo

"Volapukisto! Fiaĉulino!"

"Diabla porkino! Ĉu vi havas nur fojnon en la kapo?"

"Ne demandu, napokapo!"

Post nur kelkaj minutoj la filmo en la kinejo Aŭroro devos komenciĝi. En la granda salono kun loko por almenaŭ 450 spektantoj dise sidas kelkdek homoj. Ili ĉiuj turnas siajn vizaĝojn al du virinoj ĉe la flanko plej malantaŭe en la kinejo. Unu sidas, la alia staras. Ambaŭ insultas unu la alian. La staranta virino eĉ komencas tiri la harojn de la sidanta, kiu defendas sin per batetoj, batoj kaj bategoj.

"Hundino! Lasu mian lokon. Mi ĉiam sidas en tiu ĉi loko de post dudek jaroj."

"Lasu min, aĉulino, pro kio vi krias. Estas tiom da lokoj en la salono. Simple sidiĝu alikoke."

"Vi estas nur knabino. Ne alparolu min tiel. Dum dudek jaroj... Foriru, fridpisulo."

"Mi ne ŝanĝos lokon."

La biletkontrolisto, s-ro Möller, maltrankviliĝis. Baldaŭ komenciĝos la filmo kaj tiam devos esti ordo kaj silento en la salono. Li laboris en la kinejo nur dum tri semajnoj. Pro tio li ne sciis ĉu estas vere ke unu el la virinoj kutimis sidi en la sama loko dum dudek jaroj. Cetere, kial tio gravus, ĉar estas amaso da liberaj lokoj. Ŝaj-

nis ke jam alvenis ĉiuj vizitantoj. Li ne plu devos kontroli biletojn. Kun decidaj paŝoj li iris al la maldekstra malantaŭa angulo de la salono.

"He, sinjorinoj! Ĉesigu la disputon. Pro kio vi kverelas?"

La virinoj estis tiel maltrankvilaj ke ili nur anhele parolis:

"Tiu fiaĉulino prenis mian lokon!"

"Kiel povus esti via loko. La biletoj ja estas nenumeritaj."

"Kial vi ne povas sidi en alia loko?"

"Kial ne povas sidi en alia loko vi?"

"Trankvile, trankvile", interrompis la biletkontrolisto direktante sin al la staranta sinjorino:

"Kial vi volas sidi ĝuste en la loko kie vi sidis dum dudek jaroj. Ĉu vi eble povus provi sidi en alia loko?"

"Ĉu vi ne scias? Mia edzo estas rulseĝulo. Li nun estas en necesejo, sed kiam li revenas li povas sidi nur en la loko apud tiu ĉi. Tial mi volas..."

"Kial vi ne diris tion antaŭe?" interrompis la alia sinjorino kun hela ruĝo sur siaj vangoj kaj komencis movi sian al alia loko.

"Ĉu en la urbo ja rekonas nin..."

"Ne mi..."

La biletkontrolisto, s-ro Möller, komencis reiri al sia loko. Se nur homoj povus paroli unu al la alia kaj ne unu preter la alia.

Kirasulo